

Esperanto

Internacia

Monata organo de Internacia Esperanto-Ligo

Eldonanto : Internacia Esperanto-Ligo
Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo

Adreso de la Redakcio : Teo JUNG,
Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederl.

Vol. 3. N-ro 5

Majo 1939



CLARK GABLE KAJ ANNA DEMETRIO

veturantaj en vagonaro en la Sennoma Lando (en la filmo « Idiota Militamuzo »). *La dikega kamparanino* ĵus diris : « Mi diras al vi, se la milito venos, ni restos ekster ĝi. Aliaj batalu inter si ĝis la morto. Estos des pli bone por ni. » (En Esperanto!) — *Clark Gable* pensas : « Mi ne komprenas vian belan muzikan lingvon ; sed tamen, via ŝultro estas tre taŭga por ripoz'gi sur ĝi mian lacan kapon. »

JOSEPH R. SCHERER, Prez. de EANA :

Esperanto en grava filmo

Kiel venigi la filmon al via urbo ?

Esperanto fariĝu lingva filmstelo...

(Verkita por ĉiuj Esperantaj gazetoj kiuj deziras uzi la enhavon.)

Hodiaŭ mi volas klarigi, kiel ni esperantistoj povas uzi la filmon « Idiot's Delight » por fari vastegan propagandon por nia lingvo.

Ju pli grandan reklamon ni faros por la filmo, des pli ni samtempe varbos kaj propagandos por Esperanto.

Neniam ni havis pli mirindan oportunon por fari bruon por Esperanto — ol nun, farante reklamon por unu el la plej grandiozaj filmoj de 1939, kiu estas prezentata de la plej aristokrata filmfarejo M.G.M., kaj direktita de plej eminenta reĝisoro, Clarence Brown! Filmo, en kiu ludas dudeko da tre famaj filmsteloj, kaj precipe Norma Shearer, Clark Gable kaj Joseph Schildkraut.

La plej populara amuzilo de la popolamasoj laboras por la esperantistoj! Ĉu ni dormos?? Aŭ ĉu ni eluzos nian oportunon??

Sed **KIEL** agi en tiu ĉi okazo?? Tion demandis min esperantistoj de la vasta Esperantujo. Mi ne povas respondi al ĉiuj gesamideanoj kiuj afablis sendi (eĉ al mi) gratulojn. Sed tiuj multaj demandoj estas al mi tre valoraj. Ili helpas al mi scii kion mi aldone klarigu en miaj artikoloj pri la grandioza filmo.

Do kiel agi en la nuna momento?

ĈIU simpla unuopa samideano povas varbi same efike kiel la esperantistaj « eminentuloj ». Jen unufoje kiam la nombro estas pli grava ol « eminenteco », ĉar simpla samideano pagas same multe kiel la kluba prezidanto, kaj same multe kiel eĉ la nacia prezidanto.

ĈIU samideano, eĉ la plej junaj kaj la plej timemaj, povas helpi same efike kiel maljunaj; eĉ komencantoj povas helpi same torte kiel veteranoj en nia movado.

Ne nur via prezidanto aŭ sekretario aŭ kasistino, sed ĉiu unuopa esperantisto kunlaboru. Do kion fari?

Vizitu la kinejestrojn de via urbo aŭ vilaĝo!

Nura vizito al la kinejo por vidi la filmon NE helpos.

Nepre parolu kun la kinejestro... kaj, se iel eble, kun ĉiuj kinejestroj de via urbo. Se vi loĝas en grandurbo, vizitu la kinejestrojn almenaŭ en via urboparto. Insistu ke vi volas

persono paroli kun la direktoro aŭ posedanto de la kinejo. Nur tiam li ekscios ke Esperanto helpis por alporti multajn homojn.

Se al ĉiu kinej-posedanto venas 10-100-1000 gesamideanoj kun la sama peto, tiam ni vidos rezultojn!

Se venas 100 petantoj, la kinejestro pensos ke 2000 personoj same pensas pri la filmo kaj pri Esperanto. Se venas 1000 postulantoj, li pensos ke 20,000 loĝantoj vere interesiĝas pri la filmo pro Esperanto, ĉar li scias ke la plej multaj homoj estas tro mallaboremaj kaj flegmaj por sin ĝeni kaj iri al la kinejestro por paroli kun li.

Do ni devas nepre eluzi la indiferentecon de la vasta publiko ĉi-toje por nia propra avantaĝo. Ni do iru ĉiuj unuope kaj petu ke la kinejestro venigu la filmon kiel eble plej baldaŭ.

Sed nepre klarigu ke vi « **volas vidi la Gable-Shearer filmon pro la Esperantaj partoj de la dialogo** ».

Tiam la kinejestroj en ĉiuj partoj de Eŭropo kaj cetera mondo telegrafe aŭ ekspresletere **raportas al la landa agente de M.G.M. ke tuta armeo** da esperantistoj postulas la filmon « Idiota Amuzo » pro la Esperantaj dialogopartoj. La landaj agentoj siavice raportos al la filmfarejo M.G.M. ke la Esperantaj dialogopartoj estas kolosa allogilo tra la tuta mondo.

Tiam raportos pri tia grava sukceso la usonaj gazetoj kaj precipe la fakaj revuoj de Hollywood. Kaj tion legos la aliaj filmfarejoj, kaj ili siavice volos eluzi tiun novan lingvan filmstelon: Esperanto.

Mi ne povas sufiĉe forte ripeti ke **NE dependas de mi** en Hollywood, ĉu aliaj filmfarejoj uzos Esperanton. Ĉefe dependos de la ORDA kunlaboro de la vasta armeo da gesamideanoj en ĉiuj anguletoj de la mondo. Ĉu ili faros sian parton, aŭ ĉu nur kelkaj fervoruloj kunlaboros??

La mono en la kineja kaso kaj la profito, kiu venos al la filmfarejo, estas la plej fortaj instigiloj al plia uzado de filmsteloj... kaj samgrade al plia uzado de Esperanto en venontaj filmoj.

Ni ne permesu ke kinejestroj raportu al M.G.M. ke la bona enspezo ĉe la montrado de « Idiot's Delight » okazis pro la fameco de la

steloj Norma Shearer kaj Clark Gable. **Ni faru nian eblon por ke ili raportu al Hollywood, ke estis tre grandparte Esperanto kaj la esperantistoj kiuj kaŭzis la grandan profiton ĉe la montrado de tiu ĉi filmo.**

Ni devas nepre montri al la kinejestroj kaj al M.G.M. ke Esperanto jam nun estas same granda allogilo kiel la homaj filmsteloj. Ni faru ke **Esperanto estu rekonata kiel lingva filmstelo.**

Same kiel Mickey-Muso kaj aliaj desegnitaj karakteroj fariĝis filmsteloj en la desegnitaj filmoj kaj komencis allogi centmilionojn da homoj (kaj precipe infanojn), tiel Esperanto per propra forto de internacieco, neŭtraleco kaj relativa facileco **povas fariĝi necesajo por la filmo.** Estas en niaj manoj! Esperanto devas fariĝi same necesa kiel homaj steloj por sukcesigi la filmojn tra la mondo.

Mi firme kredas ke iom post iom Esperanto fariĝos pli grava por la filmo. Kaj tiam Esperanto estos pli forta allogilo al la filmoj ol ĉiuj nun konataj homaj filmsteloj.

Malgrava filmaktorino povas rapide fariĝi filmstelo, se dek miloj da leteroj kaj personaj laŭdoj alvenas ĉe la filmfarejo kaj ĉe la kinejestroj. En la filmo « Idiota Amuzo » Esperanto estas ankoraŭ malgrava filmaktoro. Per dek miloj da leteroj kaj precipe per personaj vizitoj al la kinejestroj por **postuli la filmon PRO ESPERANTO** ni povas fari ke Esperanto rapide fariĝu grava necesajo por la filmoj... do filmstelo.

Ĉar ni scias ke nia armeo estas relative tro malgranda por fari sensacion en Hollywood, estas necesege ke **ĈIU esperantisto faru eĉ pli ol estas lia eblo.**

Minimume unufoje kaj se eble plurtoje vizitu ĉiujn ĉefajn kaj taŭgajn kinejestrojn. Petu ke ili **baldaŭ**, ne nur post kelkaj monatoj, montru la « Gable-Shearer-filmon ». Se oni diros ke la filmo ankoraŭ ne estas havebla en via lando, atendu 2-3 semajnojn kaj postulu denove... kaj denove. Kaj post kiam vi vidis la filmon, postulu ke ĝi estu montrata denove.

★

Esperanto ne estas menciata en la filmo. M.G.M. ne volis menci en la filmokomenco ke Esperanto estas kelkloke parolata. Kvankam en kelka gazeta reklamo M.G.M. kunhelpis ĉe menciado de Esperanto, la filmfarejo ne volis indiki iel ke la loĝantoj de la sennoma lando parolas neŭtralan lingvon.

La argumento de la M.G.M. estroj estis ke oni ofte uzas vortojn kaj frazojn en kroma lingvo. Ofte oni uzas en usona filmo longajn frazojn en itala, germana aŭ hispana lingvoj, kaj oni ne speciale indikas kiujn kromajn lingvojn kelkaj geaktoroj uzos.

Ni ne forgesu — tion mi jam en pli fruaj artikoloj ripetis — ke M.G.M. ne uzis Esperanton por fari propagandon por nia movado. M.G.M. uzis Esperanton nur por eviti ofendon al iu ajn lando. M.G.M. akceptis Esperanton, ĉar nia lingvo estis utila helpilo por la filmigo de tiu teatraĵo. Esperanto servas por varbi por la paco en filmo kiu kritikas la mitemon.

Kompreneble mi mem bedaŭras ke Esperanto ne estas menciata eĉ per unu vorto. Sed ni ne sendu kritikojn pro tio. Male ni sendu gratuleterojn pro la uzo de Esperanto. Ni ne forgesu ke Esperanto en tiu ĉi filmo estas tre modesta aktoro. Estas en niaj manoj fari ke nia lingvo fariĝu filmstelo... kaj tiam ĝi estos menciata en la filmokomenco.

M.G.M. diris : « La esperantistoj kompreneble havas plenan liberecon eluzi la Esperantuzon, kaj ili povas kaj devas mem fari kiel eble plej grandan reklamon pri la fakto. »

Klopodu ĉe la M.G.M. agentejo en via lando.

En ĉiu lando oni devas fari naci-lingvajn subtitolojn por klarigi la anglan kaj Esperantan dialogojn. Se amaso da gesamideanoj jam nun skribus al la landa M.G.M. agentejo kun peto ke oni menciu Esperanton en la filmokomenco... tre verŝajne vi sukcesos. Sed tio dependas de la fervoro kaj kunlaboro de la gesamideanoj en ĉiu aparta lando.

M.G.M. informas min ke tiuj landaj agentejoj volonte sendos fotografajojn pri la filmo al ĉiuj petantoj kontraŭ malgranda pago. Ĉiuj kinejestroj scias la adreson de la M.G.M. agentejo en via lando.

★

Neniaj Esperantaj afiŝoj estos disdonataj. Sed nacilingvaj afiŝoj estos haveblaj al la kinejoj preskaŭ en ĉiu eŭropa lando, kiel tio okazas ĉe ĉiuj aliaj filmoj el Usono.

Sed la esperantistoj povas mem fari okulfrapajn Esperantajn afiŝojn kaj proponi diversspecan helpon al la kinejestroj.

Verda stelego apud la biletejo aŭ eĉ sur la trotuaro! Eble eĉ monro de ekspozicia materialo ĉe la ĉefa enirejo helpas al la kinejo kaj al la lokaj kluboj.

Se vi estas lerta varbanto, vi povos akiri permeson de la kinejestroj ke gesamideanoj disdonu flugfoliojn pri Esperanto ĉe la enirejo, aŭ eble la biletvendistino mem disdonos la flugfoliojn al la vizitantoj. Tiel ni mem zorgos pri tio ke ĉiuj, kiuj vidos la filmon, klare scios ke Esperanto estas uzata.

En la mezo de la ekspozicia materialo vi povas aldoni fotojn de Norma Shearer kaj Clark Gable kun Esperantaj aŭtogramoj dediĉitaj al la esperantistoj de la mondo. Tiuj bildoj

aperos sufiĉe frue en « Heroldo de Esperanto » kaj « Esperanto Internacia ». Kvanteto da artepresitaj kopioj estos haveblaj ĉe Heroldo kontraŭ sendo de DU respondkuponoj.

Promesu al la kinejestroj ke vi ankaŭ zorgos pri kroma reklamo pri la filmo en la tagjurnaloj PRO la Esperantaj dialogopartoj.

Promesu ke vi venigos ne nur vian tutan familion, sed ankaŭ vian tutan parencon, gemikaron kaj viajn klasanojn aŭ la klasanojn de viaj infanoj, kaj ĉiujn membrojn de viaj kegloklubo, filatelioklubo, skiklubo, gimnastika societo, kant- kaj muzikasocieto... kaj zorgos ke ili siavice varbos inter siaj familianoj.

Sed ne petu senpagajn enirbiletojn, eĉ ne por vi mem, ĉar tion farante vi jam tuj nuligas parton de via propagando por Esperanto!

Ĉiam klarigu ke « ili venos pro la fakto ke Esperanto estas uzata ». Montru ke vi jam estas informita (eble pli ol li mem) pri la beleco kaj boneco de la filmo, pere de la Esperantaj gazetoj.

★

Ne fanfaronu!

Ne parolu pri Esperanto-Filmo!

Prefere parolu pri « Gable-Shearer-Filmo kun Esperantaj dialogopartoj ». La dialogo en nia lingvo okupas malpli ol 5 0/0 de la tuta tempo! Se vi mensogas per trograndigoj, du fatalaj aĵoj povas okazi:

- multaj homoj ne venos, ĉar ili pensos ke ili ja ne komprenas Esperanton;
- multaj homoj malkontentos pro tio ke pli ol 95 0/0 de la dialogo estas en la angla lingvo.

Ni danku al la bonŝanco ke ĝuste tiuj du famegaj steloj ludas en la filmo; do ni eluzu tiun fakton saĝe kaj prudente por logi la publikon. **Se ni fanfaronas, ni nu: malhelpas al la kinejestroj.** Ni faros al ili financan domaĝon, kaj ili certe raportos ke la filmo estis bonega, sed ke pro la stulteco de la esperantistoj venis malmultaj personoj.

Ankoraŭ ne estas la tempo kiam Esperantaj filmoj logos la publikon amase, tute negrave kiu estas la ĉefa stelo. Por tion atingi, ni devas labori, labori ĉiuj unuope sed samtempe, sisteme kiel formikoj. **Esperanto venkos, kiam ni venkos la indiferentecon en niaj propraj vicoj.** Ni ne plendu pri la indiferenteco de la vasta publiko. Ni tro ofte devus plendi pri nia propra indiferenteco!

Sed dume ne fanfaronu! Ne parolu pri nova arbaro, kiam ni devas ĝoji ke ni havas tute novan filmarbeton. Ne parolu jam nun pri Esperanto-filmo, kiam vere Esperanto estas nur malgranda aktoro en la filmo.

★

Eble vi neniam iras al kinejoj. Sed nepre iru por vidi la filmon kiu faras historion en Esperantujo. Post kiam vi estos vidinta « Idiot's Delight », vi elvenos kun pli forta deziro labori por mondpaco. Eĉ se unu plia mondmilito ŝajnas esti neevitebla nun, vi deziros tamen **denove labori por la posta pli bona paco.** Vi esperos ke poste, per pli bonaj packontraktoj kaj per nova, pli vera Ligo de Nacioj, pli justa mondpaco venos al la malsana homaro.

Vi denove revos pri Ligo de Nacioj, sed nova pli bona Ligo de Nacioj, en kiu Esperanto estos oficiala lingvo, por pli juste kaj pli ĝuste pri-trakti la internaciajn problemojn. Do eĉ se vi jam senespere certas ke nova milito venos, post tiu ĉi filmo vi ekhavos novan esperon almenaŭ pri « posta paco ».

Kaj estas nia sankta devo progresigi Esperanton ĝis tia grado ke ĝi estos akceptata, devos esti akceptata, pro la vastega postulo de la tiam homaro.

Sed ne timu ke la tuta filmo estas tragedio. Multegaj tre amuzaj epizodoj alternas kun la timigaj scenoj. Precipe amuze estas kiam Clark Gable klopodas per prezentadoj de ses belegaj blondaj aktorinoj forgesigi la timigajn pensojn de la turistoj kiuj estas kunjetitaj en landlima hotelo pro eksplodo de milito.

Laŭ mia informo la filmo estos montrata en Eŭropo nur en la malfrua printempo. Do ni havas ne tro multan tempon por dume fari vastan, persistan **propagandon pri la filmo kaj por Esperanto** en la gazetoj kaj diversfoje ĉe ĉiuj kinejestroj atingeblaj.

Do ni ĉiuj eklaboru por fari el Esperanto « lingvan film-stelon »!

FERVORAJ I.E.L.-ANOJ

legas « Heroldon de Esperanto », la

SEMAJNAN

organon de Internacia Esperanto-Ligo, kiu jam komencis sian 20-an eldonjaron.

Petu 3 provnumerojn kaj librokatalogon kontraŭ unu respondkupono de la eldonejo

HEROLDO DE ESPERANTO

Harstenhoekweg 223

SCHEVENINGEN (Nederlando)